



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2017 (210) 15. 6. 2017

## Dobytí Severního pólu v esperantu



Pražští esperantisté 29. března 2017 slavnostně předali v prostorách Divadla Jára Cimrmana Zdeňku Svěrákovi esperantský překlad hry *Dobytí Severního pólu* Čechem Karlem Němcem. Překlad je společným dílem Vlasty Piščíkové, Jana Šebetovského a Víta G. Mišurce. >>> *více na str. 2*

### EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj .....	2
Dobytí Severního pólu - ukázky .....	4
La dolĉaj mortoj .....	7
Granda polica fabelo .....	8
Komika kanto .....	16
Srdce se zelenou hvězdou .....	18
Moudrost a vtip G. K. Chestertona .....	23

### Klub esperantistů v Praze

<http://bulteno.cs-retromusic.net>

Schůzky v ul. Ve Smečkách 25  
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

### Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

[t.brighacek@seznam.cz](mailto:t.brighacek@seznam.cz)

Lingvaj korektoj: Pavol Petřík

## Dobytí Severního pólu v esperantu

*Niže zařazujeme redakčně upravenou informaci ze stránek Českého esperantského svazu:*

Praha, 29. 3. 2017: „Bylo to pro mě milé překvapení. Já sám docela chápu úmysly zakladatele esperanta, že by spojil svět tímto jazykem, který čerpá ze všech možných. Je škoda, že se to nepodařilo. Esperantem se dnes stala angličtina, ale je pěkné, že po celém světě je houf lidí, kteří tento jazyk umí nebo se ho učí.“ To řekl herec Zdeněk Svěrák, když mu esperantisté předali překlad hry Járy Cimrmana Dobytí Severního pólu Čechem Karlem Němcem. Zároveň přijal čestné členství v esperantském klubu E-mental' a v České esperantské mládeži.

Na překladu hry z pera Zdeňka Svěráka a Ladislava Smoljaka pracovali členové esperantského klubu E-mental' a České esperantské mládeže Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský a Vít Guglielmo Mišurec. Ve středu 29. března ho slavnostně předali Zdeňku Svěrákovi, kterému zároveň udělili čestné členství v obou zmíněných organizacích. Čestným členstvím v České esperantské mládeži se zařadil po bok např. spisovatele, psychiatra a duchovního Maxe Kašparů či nedávno zesnulého kardinála Miloslava Vlka.

„Cimrmana máme rádi a často jsme prohazovali všelijaké cimrmanovské hlášky. A tak jsme si řekli, že by bylo dobré nějakou Cimrmanovu hru přeložit do esperanta. Rozhodli jsme se pro Dobytí Severního pólu, protože tam je málo reálií, a tak mu může rozumět i cizinec,“ vysvětluje spolupřekladatelka Vlasta Pištíková. Záznam hry s esperantskými titulky se bude promítat na mezinárodních esperantských akcích, k čemuž dal Zdeněk Svěrák společně s majiteli autorských práv k Cimrmanovým hrám svolení. Oficiální premiéra proběhla na 7. mezinárodním kongresu Svazu zdravotně postižených esperantistů, který se konal 21. až 23. dubna 2017 v RS Zámeček v Hodoníně u Kunštátu.

Překladatelé se museli popasovat se složitými slovními hříčkami. „Tak například Karel Němec už není Karel Němec, ale Karel German a přetržené dítě je lovené dítě,“ vysvětluje další z překladatelů Jan Šebetovský. Hra „Přetržené dítě“, kterou Jára Cimrman nadiktoval po návratu ze Severního pólu se silnou rýmou, takže n znělo jako d, se v esperantu jmenuje Predu la infanon (ulov dítě) namísto Prenu la infanon (vezmi dítě). „To byl největší oříšek, nad tím jsme strávili několik večerů,“ přidává se Vít G. Mišurec.

Setkání se zúčastnil i reportér Dan Mrázek, který natočil se Zdeňkem Svěrákem rozhovor. Ten by měl být odvysílán 14. dubna na ČRo Plus.

Překlad hry esperantisté Zdeňku Svěrákovi věnovali k doznívajícímu 50. výročí vzniku Divadla Járy Cimrmana (za zmínku stojí, že mj. jeden z jeho členů Pavel Vondruška esperanto výborně ovládal) a také ke stému výročí úmrtí tvůrce esperanta Ludvíka Lazara Zamenhofa, který zemřel 14. dubna 1917.

Ukázky z překladu najdete na str. 6 až 8.

## Giorgio Silfer v Praze

Ve středu 31. května 2017 vystoupil v pražské Unitarii v Anenské ulici známý švýcarský literární vědec, spisovatel a dramatik dr. Giorgio Silfer. Akci uspořádal Klub esperantistů v Praze. Vzácný host představil knihu *Historio de Esperanta literaturo* (2015), kterou napsal spolu s Carlem Minnajou, a která získala cenu OSIEK i cenu Grabowski. Na akci, která proběhla ve velmi důstojné atmosféře, se sešly téměř dvě desítky esperantistů z Prahy i ze vzdálených koutů republiky.

**La esperantistaro formas diasporan lingvan grupon,  
konforme al la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj (1996)  
kaj al la ĵusa Lingva Protokolo de Donostia  
(San Sebastián, eŭropa ĉefurbo de kulturo 2016).  
Nia specifa kulturo esprimiĝas precipe tra la skriba literaturo.  
El kio fontas tiu literaturo? Kial ĝia unua lingvospaco estis  
multetna militkaptitejo? Kiel ĝi evoluis, kaj statas nuntempe?**



### Giorgio Silfer

invitas al diskuto pri la libro verkita kun Carlo Minnaja

merkredon la 31<sup>an</sup> de majo 2017, je 18h00

ĉe Unitaria

Anenská 5, Praha 1 - Staré Mesto

*organizas Esperantista Klubo en Prago*

*(anoncu vin ĉe [hu\\_legacio@esperantio.net](mailto:hu_legacio@esperantio.net) / [t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz))*

---

Esperanta PEN-Centro – prezidanto: Walter Zelazny  
Kooperativo de Literatura Foiro – prezidanto: Perla Martinelli  
abonu ilin: *Literatura Foiro / Heroldo de Esperanto / Femina / Homarane*  
[lf-koop@esperantio.net](mailto:lf-koop@esperantio.net)

# SOMERA LEGADO

## Dobytí Severního pólu – ukázky

Zdeněk Svěrák a Ladislav Smoljak

### Saketo lerneja

Saketo lerneja  
kun ligna plumujo  
kun vi mi iradis  
tra verda Ĉeĥujo.

En vi mi portadis  
plej bonajn notetojn,  
per ili estigis  
gepatrajn ĝojetojn.

Subherbe longe jam  
lektoro Nukseto  
en tombo premetas  
en mizer-ĵaketo.

Saketo lerneja  
kun ligna plumujo,  
saluton, Nukseto,  
al via tombujo.

Kion mi ellernis,  
al naci' transdonos,  
semetoj el sako  
rikolton eldonos.

### Školní brašnička

Má školní brašničko  
s penálem dřevěným,  
s tebou jsem chodíval  
zeleným osením.

V tobě jsem nosíval  
většinou jedničky  
k radosti tatíčka,  
k radosti matičky.

Učitel Voříšek  
dávno již pod drnem  
choulí se v hrobečku  
v kabátku chatrném.

Má školní brašničko  
s penálem dřevěným,  
jak se ti, Voříšku,  
jak se ti odměním?

Vše, cos mě naučil,  
předám teď národu,  
semínka z brašničky  
vydají úrodu.



## Predu la infanon *Přetržené dítě*

Grava malkovro de la antaŭa sezono estis trovo de la Cimrman-dramo „Predu la infanon“. Teksto, kaj tio estas vere grava cirkonstanco, ne estis skribita per la mano de Cimrman. Kritikan revizion faris la kolego Brukner.

La dramon „Predu la infanon“ ni prezentis nur unufoje kiel nepublikan prezentadon por invititaj spektantoj. Kaj bedaŭrinde endas konstati, ke ni ne tro sukcesis. Ĉi tie interne ni povas eĉ diri, ke tio estis fiasko. Ĝis nun ni ricevadas leterojn de spektantoj, kiuj karakterizas la ludon kiel malmulte gajan, konfuzan kaj morbidan. La skribantoj, kiuj, kiel ni diras, ne bridas sian langon, ĝin eĉ priskribas kiel abstraktan.

Ludo estis bone akceptita nek en Esperantaj nek en Idaj gazetoj. Heroldo de Esperanto lastjare skribis: „Ni ne kontraŭas klopodon inventi novajn trinkaĵojn, sed cimrmanan ‚teon kun rubo‘ la junularo verŝajne ne taksos mojosa.“ Heroldo de Ido skribas: „Ni ne kontreas demarŝo inventar nova drinkaĵo, ma cimrmanan ‚teon kun rubo‘ la yunieraro probable ne evaluos moyosan.“ Teatra gazeto Scenejo fermas la recenzon per la malica demando, ĉu la debilulo en teatro, pri kiu oni en la teatraĵo tiomfoje parolas, estas ĉi-kaze en spektejo aŭ en scenejo.

Mi serĉis la kaŭzojn de ĉi tiu fiasko kaj mi konkludis, ke pri ĉi tiu malsukceso ne kulpas Cimrman, sed, la kolego Brukner pardonos, la kolego Brukner. Temas pri tio, ke Cimrman diktis sian teatraĵon al la najbaro Padevĉt, kiam li kuŝis ĉe li post reveno el Arkto kun forta inflamo de la supraj spiraj vojoj. Ne tre klera najbaro skribis la vortojn tiel mekanike, kiel li aŭdis ilin, kaj li ne ekkonsciis, ke la nazkataro povas sencon de iuj vortoj tute ŝanĝi. Ekzemple „m“ pro netrairebla naza kavo ŝanĝiĝas al „b“. Do „mamo“ eliros el malvarmuminta homo kiel „babo“. Aŭ se la malvarmuminta homo petas flugbileton al malta maro, facile povas okazi, ke li alteriĝos ĉe la maro balta. Kaj tio lin certe ne blezurigos.

La afero estas tute klara. La dramo, en kiu Cimrman rememoris sian infanecon travivitan en la patra kudrista laborejo, kompreneble ne nomiĝas „Predu la infanon“, sed „Prenu la infanon“. Ankaŭ en ĝi neniuj kisas abaton, sed amaton. Ni ankaŭ agnoskos la pravon de kritikistoj, ke la kudristo apenaŭ povas saltante krei „Buŝo! Buŝo!“ kaj manfrapi. La sceno tute ŝanĝiĝos, kiam ni scios, ke lin ne ĝenis buŝo, sed muŝo. Nun vi jam mem komprenos, ke la aktorino Jelínková ne instigis sian edzon esti nefidema, kiam el la dormoĉambro aŭdeblis: „Ne fidu, ne fidu.“ Ankaŭ neniuj el vi suspektos la edzinon de la kudristo, ke ŝi kokris lin, ĉar vi bone tradukos la frazon: „Mi kuŝis kun Basko sur la vizaĝo.“ Kolego Brukner ankaŭ ne devis demandi en viena hotelo Sacher pri ŝatataj trinkaĵoj, kiam li volis ekscii, kial la kudristo mendis teon kun rubo. Kompreneble li ne estis ŝparema. Kaj la teruro de la nokto, dum kiu laŭ kolego Brukner la gepatroj mortigis sian infanon, ŝanĝiĝos al simpla batalo kontraŭ narkotismo. Tiel ni devas kompreni la dialogon: „Mia heroo, ĉu vi jam zorgis pri la heroido?“ „Jes, mi forĵetis ĝin.“ Ankaŭ la financa situacio en la kudrista familio ne estis tiom terura, ke la patro devis de sia najbaro pruntepreni pordon. Eble nun ankaŭ la kolego Brukner revas pri tio.

El unu loko en la teksto videblas, ke en la domo de Padevět okazis unu trista okazaĵo. La frazo „Bi decesas balbanĝi!“ atestas pri tio, ke Padevět verŝajne ne komprenis, kion Cimrman petas kaj anstataŭ helpi al li el la lito, li la frazon nur notis.

Je la fino ankoraŭ unu rimarko: Se kolego Brukner estus pli diligenta, ni ne devus trapasi malagrablan problemon kun pacifistoj, kiuj malŝatis, ke la kudristo volis mortigi dek flavulojn, dek nigrulojn.

### **Nokt' je polus'**

Nokt' je polus'  
ja ne belus  
estante sen melanĥoli'.  
Kristan' kaj jud',  
german' de sud',  
komencas ĉiuj malĝoji.  
Eĉ al la lertegaj Laponoj  
restas nur iuj fortonoj.  
Nur unu nacio ne mortos,  
flagon al polus' fame alportos.

En la lup-  
En la lup-  
En la lupmortej'  
En la lup-  
En la lup-  
En la lupmortej'  
En la urs-  
En la urs-  
En la ursmortej'

[: ĉeĥ' disvastiĝas plej. :]

*Tradukis Vlasta Pištková, Jan Šebetovský kaj Vít G. Mišurec.*

# La dolĉaj mortoj

Giorgio Silfer

*merkredo*

*Jelpo kaj rigardo*

La estrino, kie mi libertempis en Bakonio, posedis tre simpatian hundineton: amema kokerino, kun kiu mi promenis ofte en la arbaro.

Iam la hundineto miskondutis: mi ne scias, kion teruran ŝi faris, probable ŝtelon de provianto. La mastrino punis ŝin forŝlosante sur balkono, kie bedaŭrinde la malfeliĉulino pasigis tutan nokton ŝtorman.

Matene la hundineto povis eliri al la ĝardeno, sed kiam ŝi malsata iris al la mastrino, ĉi tiu forigis ŝin per balailo. Tiam okazis io, kion mi neniam forgesos. La hundineto jelpis tiel senespere, kun rigardo same senespera. Mi neniam reaŭdis ion tiel kompatindan.

Mi estis krionta: „Sinjorino, pardonu ŝin!“, sed tiu donis duan frapon de balailo, kaj la hundineto fuĝis. Mi estis tre timida knabineto, mi ne aŭdacis paroli.

.....

- Estis la kamioneto de Jano: li pretervidas ĉion survoje. Ĉu vi imagas, kiom da hundoj kaj katoj kaj sciuroj kaj erinacoj li jam dispremis?

- Sed ĉi-foje mi ne kulpas! - sin defendis Jano, dum li kartludis en la gastejo de la vilaĝo. – Ĝi metis sin subite, kvazaŭ elirinta el nenio: la ŝoseo ne estas larĝa, aŭ trafi aŭ stiri al la abismo.

- Rakontu ĝuste: vi ne rajtus ŝofori sen okulvitroj. Kvar plus kvin: trafo! Miopa vi estas, se vi ne rimarkas, ke mi ludos ĉevalon. Kaj vi volus rimarki hundineton?!?

Mi scias, ke Jano ne mensogis. Eĉ hundo povas serĉi la morton pro la malespero esti rifuzata de la homo, kiun ĝi amas. Morto dolĉe subita. Se mi nur estus parolinta! Eble mi estus savinta vivon.

Kaj mi tiel bedaŭras, ke mi ne kapablas boji. Mi kapablas nur skribi vanajn mesaĝojn al la amata. Krome, mi bezonus la rigardon de tiu hundineto; kiel ajn, la amata estas jam fora, kiu scias, ĉu mi revidos tiun personon.

# Granda polica fabelo

Karel Čapek

Tion eble, infanoj, vi scias, ke en ĉiu policejo aŭ polica stacio viglas kelke da sinjoroj la tutan nokton, se eble io okazus, kiel se eventuale ien enstrudiĝus rabistoj aŭ se malbonaj homoj volus iun damaĝi. Tial sinjoroj policistoj en policejo ĝis mateno maldormas, dum la aliaj policistoj, kiujn oni nomas patrolo, iradas tra la stratoj kaj atentigas rabistojn, ŝtelistojn, fantomojn kaj iajn aliajn malordojn.

Kaj kiam la patrolon ekdoloros la kruroj, ĝi revenas al la policejo kaj denove alia policisto iras atenti surstrate. Tiel ĝi daŭras la tutan nokton; kaj por ke la tempo pli bone pasu al ili, la policistoj en policejo fumas pipojn kaj rakontas al si, kion kie neordinaran ili vidis.

Foje ankaŭ ili tiel fumis kaj babilis, kiam el la patrolado revenis iu policisto, atendu, ja li estis sinjoro Halaburd, kaj diris: „Saluton, junuloj! Mi raportas, ke la kruroj min doloras.“

„Sidiĝu do,“ ordonis al li la plej aĝa sinjoro policisto, „kaj anstataŭ vi iros patroli sinjoro Holas. Kaj nun, sinjoro Halaburd, rakontu al ni, kio nova en via kvartalo kaj en kiuj kazoj vi intervenis en la nomo de la leĝo.“ „Hodiaŭ nokte ne okazis multo,“ diris sinjoro Halaburd, „En strato Štěpánská batigis du katoj; ilin do en la nomo de la leĝo mi dispelis kaj admonis. Poste en Žitná strato elfalis el nesto juna pasero, domicile en numero 23. Mi venigis estingistojn el la Malnova Urbo, ke ili alveturu kun eskalo kaj transportu la koncernan paseron en ĝian neston. Ĝiaj gepatroj estis admonitaj por pli bone atenti. Kaj kiam mi iris tra Ječná strato, io ektiris min je krurumo. Mi rigardis, jen koboldo. Sciu, tiu barbulo el Karola placo.“

„Kiu?“ demandis la plej aĝa sinjoro policisto. „Tie ili loĝas pluraj: Ŝmirbard, Nurbarb nomata Avo, Misbarb, Kalvbarb, Mielpan, Kvakbarb nomata Pipo, Kokidkrur kaj Punket, tiu, kiu transloĝiĝis tien de Apolinario.“

„Tiu, ektirinta mian pantalonon,“ diris sinjoro Halaburd, „estis Kalvbarb, loĝanta en maljuna saliko.“

„Aha,“ diris la plej aĝa sinjoro policisto. „Junuloj, li estas ege brava koboldo, tiu Kalvbarb. Kiam sur Karola placo iu ion perdas, ekzemple ringon, pilkon, pilkegon aŭ pilketon, do tiu Kalvbarb ĉiam ĝin alportas al gardisto kiel honesta trovinto. Do plue.“

„Kaj la koboldo, tiu Kalvbarb,“ daŭrigis policisto Halaburd, „diras al mi: „Sinjoro policisto, mi ne povas hejmen, en mian loĝejon sur la saliko enrampis sciuro kaj ne volas min enlasi.“ Do mi elingigis sabron, iris kun Kalvbarb al lia saliko kaj alvokis en la nomo de la leĝo la sciuron, ke ĝi forlasu la hejmon kaj ne kulpiĝu pri tiaj krimoj, deliktoj kaj misfaroj, kiel estas atenco de posedaĵo, rompado de la publika ordo, perforto kaj ŝtelado. Post tio la sciuro diris: „Pa.“ Tiam mi demetis la zonan kaj mantelon kaj surgrimpis la salikon. Kiam mi estis ĉe la truo post elfalinta nodo, en kiu havas sinjoro Kalvbarb sian loĝejon, la sciuro komencis plori: „Sinjoro policisto, mi petas vin, ne arestu min! Nur mi kaŝiĝis ĉi tie ĉe sinjoro Kalvbarb, ĉar pluvis kaj en mian loĝejon venas akvo.“ - „Neniajn parolojn, sinjorineto,“ mi post tio, „prenu viajn kvin aĵojn aŭ fagofruktojn kaj paku vin al la privata loĝejo de sinjoro Kalvbarb. Kaj se ankoraŭ foje ripetiĝus, ke vi perforte aŭ inside, sen lia permeso kaj konsento penetrus en lian privatecon, mi venigos do helpotrupojn,



ĉirkaŭos vin, arestos vin kaj transportos vin katenita al la polica komisarejo. Do ek!“ - Kaj jen ĉio hometoj, kion ĉi-nokte mi vidis.“

„Neniam mi vidis iun koboldon,“ aŭdiĝis policisto Bambas. „Ĝis nun mi havis kvartalon en Dejvice kaj tie en la novaj dometoj tiaj aperaĵoj, estaĵoj aŭ kiel oni tion nomas, supernaturaj fenomenoj ne ekzistas.“

„Ĉi tie ili estas multaj,“ diris la plej aĝa policisto. „Kaj iam, kiom da ili estis! Ekzemple apud Ŝítkov-baraĵo aperadis nikso, jam ekde komenco de la mondo. Neniam la polico havis kun li malfacilaĵojn, tia ordema nikso li estis. Nikso en Libeň estas olda fripono, sed tiu el Ŝítkov estis ege brava ulo. Ja la akvotura ofico en urbo Prago nomumis lin supera urba nikso kaj pagis al li monatan salajron. Tiu nikso el Ŝítkov gardis Vultavon, por ke ĝi ne sekiĝu; inundojn li ne kaŭzis, tiujn faras provincaj niksoj el Supra Vultavo, ekzemple de Vydra, Krumlov kaj Zvíkov. Sed la nikso el Libeň pro envio provokis lin, ke li postulu de urbo Prago por siaj servoj titolon kaj salajron de magistrata konsilisto; kaj kiam en la urbodomo oni diris al li, ke tio ne eblas, ĉar li ne havas la necesan altlernejan klerecon, ofendiĝis tiu nikso el Ŝítkov kaj elloĝiĝis el Prago. Nun laŭdire li estas ĉe akvo en Dreseno. Memkompreneble, ĉiuj eblaj niksoj en Germanio ĝis Hamburgo estas ĝisostaj ĉeĥoj. Kaj ekde tiu tempo apud baraĵo Ŝítkov estas neniuj nikso. Tial en Prago estas malmulte da akvo. Kaj ankaŭ sur Karola placo dancis nokte Vaglumo. Sed ĉar ĝi misefikis kaj la homoj ilin timis, la praga komunumo interkonsentis kun ili, ke ili transloĝiĝos al Stromovka kaj tie ili flamigados kaj matene estingados okupiton el gasfabriko. Sed la okupito, kiu ilin flamigadis, dum la milito rekrutiĝis, kaj la Vaglumojn oni forgesis. Kio koncernas Najadon, nur en Stromovka ili estis dek sep; sed tri el ili iris al baletoj, unu iris al filmo kaj unu edziniĝis al iu fervojisto el Střešovice. Tri Najadoj estas en Kinský-ĝardeno, du aktivis en Gröbovka kaj unu restadas en Jelení příkop (Cervo-fosaĵo). Urba ĝardenisto el Rieger-parko volis iun Najadon domiciligi en sia parko, sed ial ŝi ne hejmiĝis tie; mi opinias, ke tie estis por ŝi tro venteme. Police enregistritaj koboldoj, apartenantaj al publikaj konstruaĵoj, parkoj, monaĥejoj kaj bibliotekoj, estas en Prago tricent kvardek sep, ne kalkulante diabletojn en privataj domoj, pri kiuj ni ne havas evidencon. - En Prago estis abundego da fantomoj, sed nun ili estas nuligitaj, ĉar science estis pruvite, ke ekzistas neniuj fantomoj. Nur en Malnova Kvartalo homoj sekrete kaj kontraŭleĝe kaŝas en subtegmento kelkajn antikvajn fantomojn, kion diris al mi kolego el la malnovkvartala komisarejo. Kaj nun, miasence, je ĉio.“

„Krom la drako aŭ hidro,“ diris policisto Kubát, „kiun oni mortigis en Žižkov en Juda Fornaro.“

„Žižkov,“ diris la plej aĝa policisto, „ĝi neniam estis mia distrikto, pri la drako do mi ne scias multon.“

„Mi ĉeestis,“ diris policisto Kubát, „sed la tuta kazo estis pritraktata kaj en sekcio de kolego Vokoun. Ĝi ekzistis jam antaŭ ege longe, ankoraŭ iam nia polica prezidanto estis sinjoro Bienert. Foje vespere do diris al tiu Vokoun iu maljuna sinjorino, ŝi estis sinjorino Částková, tabakvendistino, sed fakte ŝi estis ino sorĉista aŭ profetino kaj parco, por ke vi tion sciu, kaj tiu sinjorino Částková diris al kolego Vokoun, ke el la karto ŝi sciiĝis, ke en Juda Fornaro drako Hurdoburdo tenas en kaptiteco belegan virgulinon, kiun ĝi fortrenis de ŝiaj gepatroj; kaj la virgulino ja estas murciana princidino. „Murciana aŭ nemurciana,“ diris post tio policisto Vokoun, „tiun knabinon devas la drako transdoni al la gepatroj, aŭ mi intervenos

kontraŭ ĝi laŭ la regularo, nomata reglamento, normaro aŭ instrukcioj.“ Tion dirinte li zonis sin per ofica sabro kaj iris al Juda Fornaro. Mi opinias, ke tiel agus ĉiu el ni.“

„Mi samopinias,“ diris policisto Bambas. „Sed en Dejvice kaj Střešovice mi havis neniun drakon. Do plu.“

„Kolego Vokoun,“ daŭrigis policisto Kubát, „zonis sin per flankarmilo kaj iris tuj nokte al Juda Fornaro. Kaj je mia animo, el unu el la antroj aŭ kavernoj li aŭdas krudajn voĉojn. Kaj li prilumis ĝin per ofica elektra lampeto kaj ekrimarkis teruran sepkapan drakon; kaj la kapoj kune interparolis, respondis unu al la alia kaj iam ankaŭ disputis kaj insultis al si - sciu, tia drako havas neniujn bonmorojn, kaj se, do nur malbonajn. Kaj en angulo de la kaverno vere ploris belega virgulino ka ŝtopis al si la orelojn por ne aŭdi, kiel la drakokapoj inter si vulgare parolas.“

„Hej, vi,“ ekvokis kolego Vokoun je la drako ĝentile ja, sed tamen kun deĵora severeco, „legitimu vin; ĉu vi havas iujn dokumentojn, devenateston, servolibron, pasporton aŭ aliajn indikaĵojn?“

Tiam unu el la drakokapoj ekridaĉis, alia blasfemis, alia sakris, alia krikoleris, alia insolentis, alia insultis kaj unu elŝovadis la langon je Vokoun. Sed kolego Vokoun ne cedis kaj ekvokis: „En la nomo de la leĝo, prepariĝu kaj iru hope kun mi al komisarejo, vi kaj la knabino tie en fono.“

„Dotpru,“ ekkriegis unu el la drakokapoj. „Scias vi, ci homa neniaĵo, kiu mi estas? Mi estas drako Hurdoburdo.“

„Hurdoburdo el Grenada montaro,“ diris la dua kapo.

„Nomata ankaŭ Granda Drako Mulhacena,“ kriis la tria kapo.

„Kaj mi forglutos cin,“ ekkriaĉis la kvara, „kiel frambon,“

„Mi faros el ci ĉarpiojn, ĉifaĵojn, mi dispecetigos, dispistos cin kaj krome mi duonige disŝiros cin kie haringon, ĝis ŝutiĝos el ci segaĵo,“ ektondris la kvina kapo.

„Kaj poste mi tordos cian kolon,“ tondregis la sesa.

„Kaj for la parado.“ aldiris la sepa kapo terurvoĉe.

Kion vi opinias, junuloj, kion nun faris kolego Vokoun? Vi dirus, ke li timiĝis? Nepre ne! Vidante, ke ne eblas mildmaniere, li ekprenis deĵoran klabon aŭ bastonegon kaj per ĝi ekbatis unu drakan kapaĉon post la alia, plenforte; kaj li havis kroman forton.

„Aj, aj,“ miris la unua kapo, „tio ne estas malbona!“

„Ĵus jukis min la verto,“ diris la dua.

„Kaj min ĵus mordis surnuke ia pediko.“ diris la tria.

„Karulo,“ diris la kvara, „tiklu min ankoraŭ per la bastoneto.“

„Kaj ekbatu pli forte,“ konsilis la kvina, „por ke ĝi iom ekkraketu.“

„Kaj pli maldekstre,“ postulis la sesa, „tie ĝi ege jukas.“

„Je mi estas tiu cia vergeto tro mola,“ opiniis la sepa. „Ĉu ci ne havas ion pli duran?“

Tiam policisto Vokoun elingigis la sabron kaj sepfoje ekhakis, ĉiun kapon unufoje, ĝis ektintegis skvamoj sur ili.

„Tio estis jam pli bona,“ diris la unua drakokapo.

„Almenaŭ ĝi forhakis oreton de unu pulo,“ plaĉis al la dua kapo; „nome mi havas ŝtalajn pulojn.“

„Almenaŭ ci ekhakis tiun haron, kiu min ĵus jukis,“ diris la tria.

„Kaj ci trakombis mian tondfasonon,“ konsentis la kvara kapo.

„Per cia kombileto ci povus ĉiutage grati,“ murmuris la kvina.

„Ja la plumeton mi eĉ ne sentis,“ diris la sesa.

„Ora homo,“ diris la sepa kapo, „tiklu min ankoraŭfoje!“

Tiam policisto Vokoun ektiris deĵoran revolveron kaj sepfoje pafis, en ĉiun drakan kapon unufoje.

„Brumbrum,“ bruskis la drako, „ne ĵetu sur min sablon, mia hararo ja estos de ĝi plenplena! Tondre, tiu cia areto enflugis en mian okulon! Kaj jen, cia rubaĵero implikiĝis inter miajn dentetojn!. Nu, kaj ĝuste nun jam sufiĉe,“ ekkriaĉis la drako, ektusis per ĉiuj sep gorgoj kaj el ĉiuj sep faŭkoj sputis kontraŭ kolegon Vokoun.

Kolego Vokoun ne timiĝis; li eltiris deĵorajn instrukciojn kaj tralegis al si, kion policisto faru, havante kontraŭ si superforton; li trovis, ke tiukaze li voku helptrupon. Poste li elserĉis instrukciojn, kion fari, se ie flagras fajro, kaj trovis, ke dum tiaj cirkonstancoj li telefonu por estingistoj. Traleginte ĉion, kio estas farota, li venigis estingistojn kaj polican helptrupon. Kiel helptrupo altrotis ni ses, kolegoj Rabas, Matas, Kudlas, Fibras kaj mi, kaj kolego Vokoun diris al ni: „Junuloj, ni estas liberigontaj la knabinon el potenco de la drako. Ĝi estas ja blenda drako, kaj kontraŭ ĝi ĉiu sabro estas malforta, sed mi observis, ke la draka postnuko estas iom pli mola, por ke ĝi povu fleksiĝi. Do kiam mi diros „tri“, vi ĉiuj devas sabri ĝian postnukon. Sed unue la estingistoj devas la drakon estingi, por ke ĝi ne bruldifektu nian uniformon.“ Apenaŭ li tion findiris, kiam tra ra ra alveturis al Juda Fornaro sep motor-estingiloj kun sep fajrobrigadanoj. „Fajro-brigadanoj, atentu,“ brave ekvokis policisto Vokoun, „kiam mi diros „tri“, ĉiu el vi komencos surŝpruci unu drakan kapaĉon; vi devas direkte en la gorgëgon, kie la drako havas la tonsilojn, ĉar tra ĉi tie la fajro eliĝas. Do, atentu: unu, du, tri!“ Kaj dirinte, „tri“ la fajro-brigadanoj ekis sep akvofluojn direkte en la sep drako-faŭkojn, el kiuj flagris fajro kiel el aŭtogeno. Ŝŝŝ, kiel ĝi ŝuŝis! La drako bavis, snufis, tuskraĉis kaj gruntis, anhelis, furiozis, siblis kaj raŭkegis kaj vokis „panjo“ kaj veste bategis ĉirkaŭ si, sed la fajrobrigadanoj ne cedis kaj ŝprucigis kaj ŝprucigis, ĝis el la sep drakokapoj anstataŭ la flagranta fajro eltorentis vaporo kiel el lokomotivo, ne eblis vidi je paŝo antaŭen. Poste la vaporo maldensiĝis, la fajrobrigadanoj ĉesis ŝprucigi, ektrumpetis kaj veturis hejmen; kaj la drako, tute malsekega kaj senaplomba, nur kraĉetis kaj forkraĉadis kaj alfrotadis al si akvon el la okuloj kaj murmuris: „Atendu, buboj, tion mi ne donacos al vi!“ Kaj tiam ekkriis kolego Vokoun: „Atenton, junuloj: unu, du, tri“, ni ĉiuj policistoj ekbatis per sabroj la sep draknukojn kaj sep kapoj ruliĝis sur la tero; kaj el sep koloj elŝprucis akvo kaj ĝi ŝprucis kiel el hidranto, tiom da akvo enfluis en la drakon. „Jen iru,“ diris kolego Vokoun al la murciana principino, „sed atentu, ke ĝi ne surŝprucu vian vesteton.“

„Mi dankas vin, nobla heroo,“ diris la fraŭlino, „ke vi liberigis min el povo de la drako. Ĵus mi ludis kun miaj amikinoj en la murciana parko volejbalon kaj handbalon kaj diabolon kaj kaŝludon, kiam alflugis la dika olda drako kaj fortrenis min senhalte ĝis ĉi tie.“

„Kaj tra kie, fraŭlino, vi flugis?“ demandis kolego Vokoun.

„Trans Alĝerion kaj Malton kaj Záběhlice kaj Strašnice ĝis ĉi tie, dum tridek du horoj, dek sep minutoj kaj kvin sekundoj senhalte kaj nete,“ diris la principino murciana.

„La drako do atingis longdistancon rekordon kun pasaĝero,“ miris la kolego Vokoun. „Mi gratulis vin, fraŭlino. Sed nun mi telegrafu al sinjoro via patro, ke li venigu iun por vi.“

Apenaŭ li tion findiris, kiam rulbruis aŭto kaj el ĝi elaŭtiĝis la murciana reĝo kun la krono surkape kaj tute en ermenpelto kaj brokato kaj komencis pro ĝojo salti sur unu piedo kaj kriis: „Ora bubino, fine mi vin trovas!“

„Atendu, via moŝto,“ interrompis lin la kolego Vokoun, „Per via aŭto vi veturis tra strato kun malpermesita rapideco, komprenite? Vi pagos sep ĉeĥoslovakajn kronojn punpage.“

La murciana reĝo komencis traserĉi la poŝojn kaj murmuris: „Mi freneza, ja mi kunprenis sepcent ormonerojn, piastrojn kaj dukatojn, mil pesetojn, trimil sescent frankojn, tricent talerojn, okcent dudek markojn kaj mil ducent ĉeĥoslovakajn kronojn, naŭdek kvin helerojn, kaj nun en la poŝoj mi havas nek monereton nek helereton nek groŝeton nek speson. Plej versimile dumvoje ĉion mi elspezis pro benzino kaj punpagoj pro la nepermesita rapido. Brava kavaliro, la sep ĉeĥoslovakajn kronojn mi sendos pere de mia veziro.“ Post tio la murciana reĝo tusetis, metis la manon brusten kaj daŭrigis al la kolego Vokoun: „Laŭ via uniformo, same laŭ via majesta aperaĵo, mi vidas, ke vi estas iu potenca batalanto, princo aŭ eĉ ŝtata oficisto. Ĉar vi liberigis mian filinon kaj senvivigis la teruran hidron mulhacenan, necesus proponi al vi la manon de mia filino, sed vi havas sur la maldekstra mano fianĉrington, laŭ kio mi konkludas, ke vi estas edziniĝinta. Ĉu vi havas infanetojn?“

„Mi havas,“ diris Vokoun. „Mi havas trijaran bubon kaj bubinon en vandoj.“

„Mi gratulas,“ diris la murciana reĝo. „Mi havas nur ĉi tiun bubinon. Sed atendu, mi donos al vi almenaŭ duonon de mia murciana reĝolando. Tio estas proksimume sepdek mi kvarcent kvindek naŭ kvadrat-kilometroj da areo kun sep mil kaj cent kvin kilometroj da fervojoj, dek du mil kilometroj da ŝoseoj kaj dudek du milionoj sepcent kvindek mil naŭcent dek unu loĝantoj de ambaŭ seksoj. Do, ĉu ni mandone kontraktos?“

„Sinjoro reĝo,“ diris post tio la kolego Vokoun, „tio havas siajn malfacilaĵojn. Mi kaj la jenaj amikoj mortigis la drakon deĵordeve, ĉar ĝi ne obeis mian oficialan alvokon kaj ne volis iri kun mi al la komisarejo. Kaj pro deĵor-ago neniu el ni rajtas akcepti rekompencan, nepre ne! Mia sinjoro, tion ili malpermesis al ni.“

„Na,“ diris la reĝo. „Tamen eble mi povus duonon de la murciana reĝolando kun ĉiu establo dediĉi, por montri mian reĝan dankemon, al la tuta praga policistaro.“

„Tio estus pli ebla,“ opiniis la kolego Vokoun, „tamen ĝi havas, sinjoro reĝo, siajn malfacilaĵojn. Ni havas la tutan pragan distrikton ĝis akcizlinio, kaj kiom da irado kaj gardado ni havas nur kun Prago! Se ni havus ankoraŭ duonon de la murciana reĝolando kaj devus ĝin patroli, ni ege laciĝus pro la kurado kaj niaj kruroj nin dolorus. Sinjoro reĝo, multfoje ni dankas vin, sed al ni Prago sufiĉas.“

„Almenaŭ do,“ diris la murciana reĝo, „mi donos al vi, knaboj, ĉi tiun paketon da tabako, kiun mi kunprenis por la vojaĝo. Ĝi estas la vera murciana kaj ĝuste sufiĉas por sep pipoj, se vi ilin ne plenŝtopos. Do filinjo, ek en la veturilon kaj ni veturas.“  
- Kaj kiam li malaperis en polvo - kaj ege da polvo faris tiu reĝo - ni, nome kolegoj Ravas, Holas kaj Matas, Kudlas, Fibras kaj Vokoun kaj mi, ni iris al la policejo kaj ŝtopis niajn pipojn per la murciana tabako. Junuloj, tian tabakon mi fumis neniam en mia vivo; eble ĝi ne estis tiel forta, sed bonodoris kiel mielo, kiel vanilo, kiel

teo, kiel incenso, kiel dianto kaj bananoj, sed ĉar niaj pipoj ege fetoris, do la bonodoron ni eĉ ne sentis. Kaj la drako estis metota en muzeon, sed antaŭ ol oni venis por ĝi, ĝi gelatiniĝis, ĉar ege ĝi malsekiĝis kaj sorbiĝis de akvo kaj putriĝis. Kaj jen ĉio, kion mi scias.“

Kiam la policisto Kubát en la policejo finrakontis la fabelon pri la drako en Juda Fornaro, ĉiuj policistoj dum iom da tempo silente fumetis; versimile ili pensis pri la murciana tabako. Poste aŭdiĝis policisto Ĥoděra: „Se la kolego Kubát rakontis al vi pri la drako el Žižkov, mi rakontos al vi pri hidro el la strato Vojtěšská. Foje mi iris patrolo tra strato Vojtěšská kaj subite mi vidas en angulo ĉe preĝejo grandan ovon. Ĝi estis tiom granda, ek eĉ ne en mian deĵorkaskon ĝi povus eniĝi, kaj peza kvazaŭ ĝi estus el marmoro. Pro la tuta mondo, mi diris al mi, eble ĝi estas strut-ovo aŭ kio, mi forportos tion al la polica direkcio. - Tiam en la fako estis kolego Pour kaj ĝuste havis pikholorojn pro lumbo-malvarmumo; li hejtis do en fera forneto, ke tie estis varme kiel en bakujo, kiel en forno, kiel en sekigejo. „Ha hoj, Pour,“ mi diras, „ĉi tie vi havas varmon kiel diabla avino. Mi raportas, ke en strato Vojtěšská mi trovis ian ovon.“ „Do, metu ĝin ien,“ diris la kolego Pour, „kaj sidiĝu; kaj mi raportos al vi, kian suferon mi havas pro la lumbaj lancen-doloroj.“ Nu, kaj iom ni babilis, kiel jam tio okazas; poste krepuskiĝis kaj jen ni aŭdas en la angulo ion kraketi aŭ brueti. Ni lumigis do kaj rigardas, kaj el la ovo rampas hidro - versimile ĝi eloviĝis pro la ega varmo. Ĝi ne estis pli granda ol, ni diru, pudelo aŭ terhundo, sed ĝi estis hidro, tuj ni ekkonis tion, ĉar ĝi havis sep kapojn; laŭ tio nome oni ekkonas drakon.

„Hu, hu,“ diris la kolego Pour, „kion kun ĝi ni faros ĉi tie?“

Mi telefonu por senfeligisto, por ke la beston li likvidu.“

„Sciu, Pour,“ mi diris al li, „tia hidro estas sufiĉe rara besto; mi opinias, ke ni donu anoncetojn en ĵurnalojn, por ke anonciĝu ĝia posedanto.“

„Nu bone,“ diris Pour, „sed dume per kio ni ĝin manĝigos? Mi provos tion per lakto kaj pecigita bulko; por ĉiu ido lakto estas plej saniga.“

Li dispecetigis do sep bulkojn en sep litrojn da lakto; vi devus vidi, kiel la drakido avido ĝin ekmanĝis; unu kapo forpuŝadis de la pelveto la alian kaj ĉiuj ĉi kapoj gruntis je si kaj lektrinkis la lakton, ĝis ili verŝmalsekigis la tutan oficejon; poste unu kapo post la alia sin ĉirkaŭlekis kaj metiĝis al dormo. Poste la kolego Pour ŝlosis la hidron en sia oficejo, kie estis deponitaj ĉiuj perditaj kaj retrovitaj aĵoj el la tuta Prago, kaj en ĉiujn ĵurnalojn li donis la jenan anonceton:

„Drakido, ĵus eloviĝinta, estis trovita en Vojtěšská-strato. Ĝi estas sepkapa, flave kaj nigre striita. Ĝia posedanto anonciĝu ĉe la polica direkcio, fako perdoj-trovoj.“

Kiam matene la kolego Pour eniris en sian oficejon, li diris nenion pli ol: „Jenjenjen huhu ve ufuf damne miltondroj, ĉe ĉiuj diabloj, por ke mi ne sakru!“ Ĝi, la hidro, forvoris dum la nokto ĉiujn aĵojn, kiujn iu en Prago perdis aŭ trovis, do ringojn kaj horloĝojn, monujojn, mansaketojn kaj notlibrojn, pilkojn kaj krajonojn kaj cirkel-garniturojn kaj gantojn kaj krome ĉiujn oficialajn dokumentojn, aktojn, protokolojn kaj listojn, mallonge ĉion, kio estis en la oficejo de Pour, eĉ pipon de Pour, ŝovelilon por karbo kaj liniilon, per kiu Pour liniis siajn listojn: la hidro formanĝis tiom, ke ĝi estis duoble pli granda kaj kelkaj ĝiaj kapoj naŭzis.

„Tiel do ne eblos,“ diris la kolego Pour, „ĉi tiun beston mi ne povas lasi ĉe mi.“ Kaj li telefonis al Bestprotektita Societo, ke la suprenotita estimata societo disponigu al la drakido rifuĝejon, same, kiel ĝi faras tion por perdiĝintaj hundetoj kaj katetoj.

„Kial ne,“ diris la Societo kaj prenis la drakidon en sian azilon. „Sed ŝate ni sciis,“ diris poste la Societo, „per kio fakte tia hidro sin nutras. Naturscienco ne pritraktas tion.“ Ili provis tion do kaj manĝigis la drakon per lakto, kolbasetoj, salamo, ovoj, karoto, kaĉo, ĉokolado, ansersango, pizo, fojno, supo, greno, ekstracervelaso, tomatoj, rizo, bulkoj, sukero, terpomoj kaj sekigitaj fruktoj; la drakido ĉion englutis kaj ankoraŭ forvoris iliajn librojn, gazetojn, bildojn, pordoklinkojn kaj entute ĉion, kion ili tie havis; kaj ĝi kreskis tiom, ke ĝi estis pli granda ol sanbernarda hundo. Sed dume venis al la Societo telegramo eĉ el Bukureŝto, en kiu estis skribite per magiista skribo:

„La drakido estas ensorĉita homo. Detalojn parole.  
Mi alveturos dum tricent jaroj al Wilson-stacidomo.

Magiisto Bosko“

Tiam la Bestprotekta Societo gratis sin postorele kaj diris: „Uf, se la hidro estas ensorĉita homo, ĝi estas do homa persono, kaj ni ne povas lin teni sub bestoprotektado. Ni devas lin sendi en trovitejon aŭ orfejon.“ Sed la trovitejoj kaj orfejoj rediris: „Nu, se tiu homo estas ensorĉita je besto, li ne estas do homo, sed besto, ĉar li estas ensorĉita je besto. Sekve la ensorĉita homo ne apartenas en nian sektion, sed al la bestprotekto. Kaj ĉar ili ne povis akordiĝi pro tio, ĉu homo ensorĉita je besto estas pli homo aŭ pli besto, volis pri la hidro zorgi nek unuj nek la aliaj kaj la povrulo hidro ne sciis, kies fakte ĝi estas; tio ĝin tiom ĉagrenis, ke ĝi ĉesis manĝi, ĉefe ĝiaj tria, kvina kaj sesa kapoj. En la Societo estis iu malgranda kaj magra hometo, sensignifa kaj modesta kiel malplena guŝo, lia nomo komenciĝis je N: Nováček aŭ Nerad aŭ Nohejl - aŭ ne, li nomiĝis sinjoro Trutina; kaj kiam tiu sinjoro Trutina vidis, kiel pro aflikto velkas unu hidra kapo post la alia, li diris al tiu Societo: „Sinjoroj, estu aŭ homo aŭ besto, mi prenis la hidron en la hejmon kaj dece zorgus pri ĝi.“

Tiam ĉiuj diris: „Hura, hura,“ kaj sinjoro Trutina forkondukis la hidron en sian hejmon.

Vere oni devas diri, ke li zorgis pri ĝi, kiel decas: li manĝigadis ĝin kaj kombis kaj karesis - tiu sinjoro Trutina ege ŝatis bestojn; kaj ĉiuvespere, veninte hejmen el la laboro, li kondukis ĝin promene, por ke ĝi iom kuradu; kaj ĝi saltetis post li kiel hundeto kaj vostumis kaj aŭdis je la nomo Amina. Foje vespere renkontis ilin sinjoro senfeligisto kaj diras: „Stop, sinjoro Trutina, kian beston vi havas? Se ĝi estas ia rabobesto aŭ bestio aŭ besto sovaĝa, vi ne rajtas ĝin konduki tra stratoj; sed se ĝi estas hundeto, vi devas aĉeti al ĝi hundomarkon kaj pendigi sur ĝian kolon.“ „Ĝi estas ia rara hundospecio,“ diris sinjoro Trutina, „tiel nomata vertago draka aŭ levrelo hidra aŭ hundo sepkapa, ĉu, Amina? Estu senzorga, sinjoro senhaŭtigisto, la hundomarkon mi aĉetos al ĝi.“ Kaj li aĉetis hundomarkon al ĝi, kvankam, povrulo, li devis doni pro ĝi la lastan kronon, kiun li havis. Kaj denove renkontis ilin sinjoro senfeligisto kaj diris: „Sinjoro Trutina, tiel ne eblas; se tiu via hundeto havas sep kapojn, ĝi devas havi hundomarkon sur ĉiu kolo, ĉar ekzistas ordono, ke ĉiu hundo devas havi sur la kolo hundomarkon.“ „Sed, sinjoro senfeligisto,“ defendis sin sinjoro Trutina, „Amina ja havas la hundomarkon sur la meza kolo!“ „Egale,“ diris sinjoro senfeligisto, „sed la ceteraj sep kapoj kuras sen la marko sur la kolo kaj tion toleri mi ne povas. Tiun vian hundaĉon mi devas konfiski.“ „Mi petas vin,“ diris sinjoro Trutina, „atendu kun tio ankoraŭ tri tagojn, mi aĉetos la markojn al Amina.“ Kaj li iris hejmen tute malfeliĉa, ĉar kontraŭe li havis eĉ ne dekheleron.

Hejme li eksidis kaj mire, ke li ne ploris, kiel lin tio afliktis; li diris al si, ke sinjoro senfeligisto forprenos de li lian Amina kaj vendos ĝin al cirko aŭ ĝin mortigos. Kaj dum tiel li suferis kaj ĝemis, proksimiĝis al li tiu hidro kaj metis al li ĉiujn sep kapojn en la sinon kaj rigardis en liajn okulojn per tiaj bele tristaj okuloj; tiajn belajn kaj ĝuste homajn okulojn havas ĉiu besto rigardanta la homon kun amo kaj konfido. „Mi ne donos cin, Amina,“ diris sinjoro Trutina kaj frapetis la hidron sur ĉiuj sep kapoj; kaj poste li prenis sian horloĝon post la paĉjo kaj sian festveston kaj siajn plej belajn ŝuojn kaj ĉion ĉi li vendis kaj ankoraŭ iom da mono prunteprenis kaj por ĉiu ĉi mono li aĉetis ses hundomarkojn kaj pendigis al sia hidro sur kolzonojn. Kaj kiam li eliris kun ĝi en straton, ĉiuj markoj do tintis kaj sonoris, kvazaŭ veturus sledo kun tintiloj.

Sed ankoraŭ tiuvespere venis al sinjoro Trutina lia sinjoro domposedanto kaj diras: „Sinjoro Trutina, tiu via hundo iel ne plaĉas al mi. Ne tro mi komprenas la hundojn, sed onidire ĝi estas drako; kaj tion toleri en mia domo mi ne povas.“

„Sinjoro domposedanto,“ diris sinjoro Trutina, „Amina tamen neniun nocis!“ „Tutegale,“ diris sinjoro domposedanto, „sed en solida domo ne estas loko por drako, kaj fino. Se vi ne volas forigi la hundon, mi malluigas vin ekde la unua. Mian respekton, sinjoro Trutina.“ Kaj li brufermis post si la pordon.

„Vidu do, Amina,“ ekploris sinjoro Trutina, „nun al ĉio ĉi ni devas de ĉi tie transloĝiĝi; sed mi ne donos cin.“ Tiam silente alŝovis sin la hidro al li kaj ĝiaj okuloj tiom belege brilis, ke tion elteni sinjoro Trutina ne povis. „Nu, nu,“ li diris, „sciu mia maljuna, ke mi amas cin.“

Tagon poste zorgoplene li iris en sian laboron - nome li estis skribisto en ia banko; kaj tie venigis lin al si lia ĉefo. „Sinjoro Trutina,“ diris tiu sinjoro ĉefo, „viaj privataj aferoj neniel interesas min, sed ekzistas iaj strangaj onidiroj, ke hejme vi bredas drakon. Drakon povas permesi al si nur iu reĝo aŭ sultano, sed por ordinaraĵoj homoj tio ne estas. Sinjoro Trutina, vi vivas tro super viaj rimedoj. Aŭ la drakon vi forigos, aŭ ekde la unua mi maldungas vin.“ „Sinjoro ĉefo,“ diris Trutina mallaŭte, sed firme, „mian Amina mi ne fordonos.“ Kaj li iris hejmen tiom afliktite, ke ĝi ne estas eldirebla.

Hejme li sidiĝis kiel korpo sen animo kaj el la okuloj komencis flui larmoj. „Nun estas mia fino,“ li diris kaj ploris. Kaj tiam li sentis, kiel la hidro metis unu kapon sur liajn genuojn; pro larmoj li ne vidis ĝin, sed karesis ĝin kaj flustris: „Ne timu, Amina, mi ne fordonos cin.“ Kaj dum li ĝin karesas, komencis ŝajni al li, ke la kapo estas iel mola kaj krispa; kaj li elfrotis siajn okulojn kaj ekrigardis - kaj anstataŭ la hidro genuas antaŭ li belega virgulino, apogas sian mentonon je liaj genuoj kaj dolĉe rigardas en liajn okulojn. „Disinjoro,“ ekkriis sinjoro Trutina, „kie estas Amina?“ „Mi estas principino Amina,“ diris la junulino, „ĝis la nuna momento ensorĉita en la hidron, ĉar mi estadis orgojla kaj kolerema. Sed jam ne, sinjoro Trutina, mi estos brava kiel ŝafido.“

„Amen,“ aŭdiĝis en la pordo, kaj tie staris magiisto Bosko. „Vi liberigis ŝin, sinjoro Trutina. Ĉiu amo liberigas la homojn kaj bestojn el ilia ensorĉo. Aj, aj, infanoj, kiel bone ĝi finiĝis! Sinjoro Trutina, paĉjo de ĉi tiu fraŭlino sendas al vi sciigon, ke vi veturu en lian reĝolandon por surtroniĝi. Do ek, por ke ni ne maltrafu trajnon.“

Kaj jen la fino de la kazo kun la hidro el Vojtěšská strato,“ findiris la policisto Ĥoděra. „Se vi ne volus kredi, demandu la kolegon Pour.“

*Tradukis Josef Vondroušek*

## Komika kanto

Jerome Klapka Jerome

Parolante pri komikaj kantoj kaj amikaj kunvenoj, mi memoras pri kurioza okazaĵo, en kiu mi partoprenis; ĉar ĝi ĵetas multe da lumo sur la internan mensan funkciadon de la homa naturo ĝenerale, ĝi rajtas, mi kredas, esti registrita en ĉi tiuj paĝoj.

Ni estis laŭmoda kaj kulturita amikaro. Ni portis niajn plej bonajn vestojn, ni parolis belete kaj estis tre feliĉaj — ĉiuj krom du junuloj, studentoj, kiuj ĵus revenis de Germanujo, trivialaj junuloj, kiuj ŝajnis maltrankvilaj kaj ĝenataj, kvazaŭ ili trovus la aferon seninteresa. La vero estas, ke ni estis tro kleraj por ili. Nia brila, sed polurita interparolado kaj niaj altrangaj gustoj ilin superpasis. Inter ni ili estis maloportunaj.

Tie ili neniam devus esti. Pri tio ĉiuj samopiniis, poste. Ni ludis pecojn de la malnovaj germanaj majstroj. Ni diskutis pri filozofio kaj etiko. Ni amindumis kun gracia digno. Ni eĉ estis spritaj — en altranga maniero.

Post la vespermanĝo iu deklamis francan poezion kaj ni diris, ke ĝi estas belega; poste iu sinjorino kantis sentimentalajn kanton hispanlingve kaj ĝi igis unu-du el ni plori — tiel kortuŝa ĝi estis.

Tiam tiuj du junuloj stariĝis, kaj nin demandis, ĉu iam ni aŭdis sinjoron Slossenn Boschen (kiu ĵus alvenis kaj estis tiam malsupre en la vespermanĝa salono) kanti sian konatan germanan komikan kanton. Neniu el ni aŭdis ĝin, laŭ kio ni povis memori. La junuloj diris, ke ĝi estas la plej komika kanto iam verkita kaj ke sinjoron Slossenn Boschen, kiun ili konas tre bone, ili persvados kanti ĝin, se tio plaĉos al ni. Ili diris, ke ĝi estas tiel ridiga, ke foje kiam sinjoro Slossenn Boschen ĝin kantis antaŭ la germana imperiestro, lin (la germanan imperiestron) oni devis forporti al la lito.

Ili diris, ke neniu povas ĝin kanti kiel sinjoro Slossenn Boschen; li estas tiel serioza la tutan tempon, ke oni povas kredi, ke li deklamas tragedion, kaj tio, kompreneble, faras ĝin multe pli ridiga. Ili diris, ke li eĉ ne unu fojon sugestas per sia tono aŭ sinteno, ke li kantas ion komikan — tio malbonigus ĝin. Estas lia mieno, plena de seriozeco, preskaŭ de kortuŝeco, kiu igas ĝin tiel nerezisteble amuza.

Ni diris, ke ni sopiras aŭdi ĝin, ke ni deziras bone ridi; ili malsupreniris kaj venigis sinjoron Slossenn Boschen.

Li ŝajne tre ĝojis kanti ĝin, ĉar li tuj venis kaj sidiĝis ĉe la fortepiano senvorte.

—Ho, ĝi amuzos vin. Vi satridos, — flustris la du junuloj, transpasante la ĉambron kaj sin lokante netrudeme malantaŭ la dorson de la profesoro.

Sinjoro Slossenn Boschen akompanis sin mem. La preludo ne sugestis komikan kanton. Ĝi estis stranga sentoplana melodio. Efektive ĝi igis venton flugi sub la haŭto; sed ni flustris unu al la alia, ke tio estas la germana maniero, kaj ni nin preparis por ĝui ĝin.

La germanan lingvon mi ne komprenas. Mi lernis ĝin en la lernejo, sed forgesis ĉiun vorton du jarojn poste kaj de tiam fartis multe pli bone. Tamen mi ne deziris, ke mian nescion divenu la homoj tie; mi do elpensis ion, kio ŝajnis al mi bonega ideo. Mi rigardis la du junajn studentojn kaj ilin sekvis. Kiam ili subridaĉis, ankaŭ mi subridaĉis; kiam ili ridegis, ankaŭ mi ridegis; mi ankaŭ aldonis kelkfoje



malgrandan subridon tute sola, kvazaŭ vidante pecon de amuzaĵo, kiun la aliaj maltrafis. Tion mi konsideris aparte ruza miaflanke.

Mi rimarkis, dum progresis la kanto, ke multaj aliaj homoj krom mi ŝajnis fikse rigardi la du junulojn. Ankaŭ ĉi tiuj aliaj homoj subridaĉis, kiam subridaĉis la junuloj, kaj ridegis, kiam ridegis la junuloj; ĉar la junuloj subridaĉis kaj ridegis kaj ridis preskaŭ senĉese dum la tuta kanto, tial la akcepto estis bonega.

Tamen tiu germana profesoro ne ŝajnis feliĉa. Unue, kiam ni komencis ridi, lia mieno registris surpriziĝon kvazaŭ ridadon li tute ne estus atendinta. Tion ni trovis tre amuza; ni diris, ke lia serioza sinteno estas duono de la ŝerco. La plej malgranda aludeto liaflanke, ke li scias, kiel ridinda li estas, estus ĉion ruiniginta. Dum ni daŭre ridis, lia surpriziĝo cedis lokon al esprimo de ĉagreniĝo kaj indigno kaj kun malserena vizaĝo li furioze ĉirkaŭrigardis nin ĉiujn (krom la du junuloj, kiujn li ne povis vidi, ĉar ili estis malantaŭ li). Tio nin konvulsiigis de ridado. Ni diris unu al alia, ke ĉi tiu afero mortigos nin. Nur la vortoj, ni diris, sufiĉas por meti nin en paroksismojn de ridado, sed aldonitaj al lia ŝajniga seriozeco — ho, tio estis tro!

En la lasta strofo li superis sin mem. Li nin severege ĉirkaŭrigardis per mieno tiel intense furioza, ke se ni ne estus antaŭe avertitaj pri la germana maniero de komika kantado, ni fariĝus timigitaj; en la strangan muzikon li enmetis tian plorkrian tonon de angoro, ke se ni ne estus sciintaj, ke ĝi estas komika kanto, ni eble plorus.

Li finis meze de laŭta ridego. Ni diris, ke tio estis la plej komika afero, kiun ni iam en la tuta vivo aŭdis. Ni diris, kiel strange estas, ke malgraŭ tiaj faktoj ekzistas ĝenerala ideo, ke mankas al la germanoj sento por humuro. Ni demandis la profesoron, kial li ne tradukas anglalingven tiun kanton, por ke ankaŭ la vulgaraj homoj ĝin komprenu kaj aŭdu vere komikan kanton.

Tiam sinjoro Slossenn Boschen stariĝis kaj elverŝis sian koleron. Li blasfemis al ni en la germana lingvo (kiun mi taksas rimarkinde efika lingvo por tiu celo), li dancis kaj skuis la pugnojn, kaj nomis nin ĉio, kion permesis lia scio de la angla lingvo. Li diris, ke neniam en la vivo oni lin tiel insultis. Ŝajnas, ke lia kanto tute ne estis komika kanto. Ĝi temis pri junulino, kiu loĝis en la Haremontoj kaj kiu fordonis la vivon por savi la animon de sia amanto; li mortis kaj renkontis ŝian spiriton en la aero; poste, en la fina strofo, li amtrompis ŝian spiriton kaj foriris kun alia spirito — pri la detaloj mi ne estas tute certa, tamen mi scias, ke ĝi estis tre malĝoja. Sinjoro Boschen diris, ke li kantis ĝin foje antaŭ la germana imperiestro, kaj li (la germana imperiestro) ploris kiel malgranda infano. Li (sinjoro Bosche) diris, ke ĝi estas ĝenerale rekonata kiel unu el la plej tragikaj kaj kortuŝaj kantoj en la germana lingvo.

Estis por ni tre malfacila situacio — tre malfacila ŝajne ne estis ia respondo. Ni ĉirkaŭrigardis por trovi la du junulojn, kiuj tion okazigis, sed la domon ili jam forlasis, sen parado, tuj post la fino de la kanto.

Tio finigis la kunvenon. Mi neniam vidis kunvenon disiĝi tiel kviete kaj kun tiel malmulte da ekscito. Ni eĉ ne diris unu al alia bonan nokton. Ni malsupreniris unuope, pagis mallaŭte kaj nin tenis ĉe la ombra flanko. Per flustroj ni petis de la servisto la ĉapelon kaj palton, malfermis mem la pordon, glitis eksteren kaj rapidis al la stratangulo, evitante unu la alian kiel eble plej multe.

De tiam mi ne multe interesiĝas pri germanaj kantoj.

*Tradukis G. Badash, M. Munrow*

## Srdce se zelenou hvězdou *Verda koro*

Julio Baghy

*Autor napsal román jako čítanku pro esperantisty, začátečníky, kteří chtěli pokračovat ve studiu jazyka. Popisuje však skutečné události na Dálném východě a skutečné postavy. Jelikož jde o učební texty, věty jsou krátké a slovní zásoba omezená na běžná slova, ale postupně s dějem se slovní zásoba rozšiřuje.*

### **Kurz v Lidovém domě na Sibiři**

Třída: jedny dveře, dvě okna. Dveře jsou nízké, okna úzká. Nábytek je starý: černá tabule, jednoduchý stůl, jedna židle a dlouhé lavice. Na stropě je elektrická lampa, není dostatečná. Strop je šedivý a podlaha je špinavá. Na stěnách jsou obrazy k výuce s vyobrazením věcí, květin, zvířat a lidí.

Ve žlutých dlouhých lavicích sedí muž, místní poštovní úředník, dva vojáci v ruských uniformách, tři jiní vojáci v české, rumunské a americké uniformě, jedna paní, tři dívky v gymnaziálních uniformách a dva chlapci.

Sledují učitele.

Učitel je voják, ale nemá uniformu. Je Maďar a vojenský zajatec. Chodí po třídě, ukazuje na obrazy, dotýká se věcí. Vyučuje a přítomní mu překvapivě rozumějí.

„Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni parolas en Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas politiko? Ne! Ĉu ĝi estas religio? Ne! Ĝi estas kulturo. Ĉu vi komprenas?“

*Dámy a pánové, mluvíme jazykem esperanto. Co je esperanto? Je to politika?*

*Ne! Je to náboženství? Ne! Esperanto je kultura. Chápete mě?*

Učitel se ptá, žáci odpovídají.

„Ĉu vi ŝatas kulturon, fraŭlino Smirnova?“ *Vážíte si, máte ráda kulturu, slečno Smirnová?*

„Mi ŝatas ĝin, sinjoro. Ni rusoj ŝatas la kulturon.“ *Ano pane, my Rusové si ceníme, máme rádi kulturu.*

„Mi scias kaj gratulas.“ *Ano, já vím, gratuluji vám.*

„Mi dankas.“ *Děkuji.*

Učitel se ptá mladého ruského vojáka: „Kiu vi estas?“ *Jak se jmenujete?*

„Mi estas Janis Lekko.“ *Jsem Janis Lekko.*

„Ĉu vi estas ruso?“ *Jste Rus?*

„Ne, mi estas latvo kaj rusa soldato.“ *Ne, jsem Lotyš a ruský voják.*

„Ĉu vi ŝatas Esperanton?“ *Máte rád esperanto?*

„Jes, sinjoro...“ *Ano, pane.*

„Mi dankas... Kaj vi, fraŭlino, kiu vi estas?“ *Děkuji... A vy slečno, kdo vy jste?*

„Mi estas gimnazia lernantino, sed mi ne estas rusa knabino. Mi estas polino.“ *Jsem gymnazistka, ale nejsem Ruska. Jsem Polka.*

„Ĉu la poloj ŝatas la kulturon?“ *Poláci si také cení kulturu, mají ji rádi?*

„Ho, jes, sinjoro!“ *Jistě, pane.*

Učitel chodí po třídě a ptá se. Žáci tvoří věty. Jen Iĉio Pang, mladý Číňan odpověděl zajímavě: „Mi estas malgranda ĉino kaj mi scias la kulturon“ *Jsem malý Číňan a vím, co je kultura.*

„Knabo, la frazo estas malbona. Bona frazo estas: mi ŝatas la kulturon.“

*Chlapče, věta je špatně. Správně je: mám rád, cením si kulturu.*

„Ne, sinjoro, la frazo estas bona. Mi scias, kio estas kulturo.“ *Ne pane, věta je dobře. Já vím, co je to kultura.*

Všichni se dívají na chlapce a nerozumí.

„Kio estas kulturo?“ *Co je tedy kultura?* Ptá se učitel.

„Ĉu vi ne scias, sinjoro? Kulturo estas homa kompreno. Mi ŝatas kaj lernas Esperanton. Ĝi estas homa kompreno – kulturo.“ *Vy nevíte, pane? Kultura je lidské chápání. Cením si a učím se esperanto. Esperanto je pro pochopení mezi lidmi, je to kultura.*

V prosté sibiřské třídě žáci a žákyně chápou, co je dobrá a krásná kultura, ale... ale v Lidovém domě není jen tato třída. Je tam i knihovna a divadlo a... v knihovně si hrají myši a kočka, v divadle hrají Rusové a politika. Kočka žere myši, politika požírá Rusy... a v šedivé špinavé třídě vojenský zajatec vyučuje esperanto.

„Sinjorinoj kaj sinjoroj, Esperanto estas homa kompreno. En la ĉambro sidas rusoj, ĉeĥo, polo, latvo, slovako, rumano, germano, ĉino kaj hungaro. Ili estas homoj. Kiaj homoj ili estas? Modernaj homoj. La modernaj homoj ŝatas la kulturon kaj ili lernas Esperanton, lernas homan komprenon.“ *Dámy a pánové, esperanto je lidské porozumění. V místnosti sedí Rusové, Čech, Polák, Lotyš, Slovák, Rumun, Němec, Číňan a Maďar. Jsou to lidé. Jací lidé to jsou? Moderní a pokrokoví. Cení si kulturu, učí se esperanto, učí se lidskému porozumění.*

### **Učitel a žačka**

Učitel sklapl svou malou knížku a vložil ji do kapsy.

„Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi deziras al vi bonan nokton, ĝis revido!“ *Dámy a pánové, přeji vám dobrou noc, nashledanou!*

„Ĝis revido!“ odpovídají žáci.

Mladý Iĉio Pang otvírá dveře třídy a žáci odcházejí domů. Jen starý poštovní úředník, polská dívka a učitel zůstávají. Pošťák je zkušený esperantista.

Konečně si může s učitelem popovídat.

Marja Bulská, polská dívka, je schopná studentka městského gymnázia. Mluví polsky a rusky, učí se německy a latinu, ale nerozumí dlouhým větám v novém světovém jazyku. Ano, nerozumí slovům, ale má oči, představivost a srdce. Vidí dva lidi: mladého a starého, Rusa a Maďara. Rus má jen jednu ruku.

Kde ztratil druhou? V dívčí fantazii se zjevuje válka. Dívka svou duší rozumí hovoru těch dvou. Kreslí jí její fantazie skutečně čistou pravdu? Kdo ví? Vidí dva lidi: jednorukého Rusa, který vytahuje cigaretu z kapsy a maďarského zajatce, který děkuje a bere si cigaretu od Rusa. V očích obou mužů vládne klid, kterému Marja Bulská dobře rozumí.

Učitel nyní otvírá dveře a všichni vycházejí na cestu před Lidový dům.

„Ĝis revido!“ říká pošťák a podává učiteli ruku.

„Ĝis revido, sinjoro Kuratov kaj bonan nokton!“ *Nashledanou, pane Kuratove, a dobrou noc!*

Marja Bulská zůstává u dveří. Dívá se za poštovním úředníkem, který směřuje k poště. Ten bydlí v domě, který patří poště, kde pracuje.

Učitel se chce rozloučit s Marjou, ale ta si chce ještě povídat.

„Kie vi loĝas, sinjoro instruisto?“ *Kde bydlíte, pane učiteli? Začíná odvážně a v hlavě si již připravuje další krátké věty.*

„Mi loĝas en kazerno de la militkaptitoj.“ *Bydlím v kasárnách pro válečné zajatce.*

„Mi scias, mi scias, sinjoro, vi loĝas ne en la urbo, sed ekster la urbo. Ĉu ne?“ *Vím, vím, pane, nebydlíte ve městě, ale mimo město. Že?*

„Jes, fraŭlino. Kie vi loĝas?“ *Ano slečno. Kde bydlíte vy?*

„En la strato Kitajskaja.“ *V Čínské ulici. (Kitaj – rusky Čína).*

„Ni havas saman vojon en la urbo.“ *Máme stejnou cestu městem.*

„Jes, ni havas saman vojon kaj mi estas feliĉa. Mi ŝatas Esperanton kaj mi deziras konversacion en la nova lingvo kaj...kaj... mi... jes... Ho, mi ne scias la vortojn! Mi estas malfeliĉa. Mi ne havas bonan kapon. Mi estas malinteligenta knabino... Esperanto estas malfacila lingvo.“ *Ano, máme stejnou cestu a já jsem šťastná. Mám ráda esperanto a přála bych si tím novým jazykem povídat a... a... já... ano... Nemám slova! Jsem nešťastná. Nemám dobrou hlavu. Nejsem dost inteligentní... Esperanto je nesnadné.*

„Fraŭlino, vi havas inteligentan kapon. Mi scias. La parolo, kiun vi faras, havas muzikon de la vortoj kaj la frazoj, kiujn vi faras, estas simplaj, sed bonaj. Nun ankaŭ mi faros nun simplajn frazojn. Ĉu vi komprenas ilin?“ *Slečno, máte inteligentní hlavu. Já to vím. Vaše slova zní hezky, vaše věty jsou jednoduché, ale správné. Teď i já budu používat jen jednoduché, krátké věty. Rozumíte jim?*

„Mi komprenas ne nur frazojn, sed ankaŭ vin.“ *Rozumím nejen větám, ale chápu i vás.*

„Ĉu?“ *Opravdu?*

„Jes. Vi estas militkaptito, kiu loĝas en siberia kazerno. Vi ne havas hejmon. Homoj, kiujn vi amas, loĝas en Eŭropo kaj ne en Azio. Du kontinentoj, du malsamaj mondoj ili estas. Vi, homo de Eŭropo, parolas al homoj de Azio. Vi deziras bonon kaj feliĉon al la homoj kaj... kaj vi estas malfeliĉa.“ *Ano, jste zajatec, který bydlí v kasárnách na Sibíři. Nemáte domov. Lidé, které milujete, žijí v Evropě, ne v Asii. Dva kontinenty, dva nestejně světy to jsou. Vy, člověk z Evropy, mluvíte s lidmi z Asie. Vy přejete dobro a štěstí lidem a... a vy sám jste nešťastný.*

„Feliĉa mi ne estas. Jes, jes, fraŭlino, vi bone komprenas min.“ *Šťastný nejsem. Ano, ano, slečno, vy mi dobře rozumíte.*

„Ĉu? Ho, mi estas feliĉa. Ne nur Iĉio Pang, la juna ĉino, sed ankaŭ Marja Bulská komprenas vin. Vi estas malfeliĉa militkaptito, sed vi estas riĉa, riĉa homo.“ *Opravdu? To jsem šťastná. Nejen Iĉio Pang, mladý Číňan, ale také Marja Bulská vám rozumí. Jste nešťastný válečný zajatec, ale vy jste bohatý, bohatý člověk.*

„Ĉu vi pensas? La poŝo...“ *Myslíte? Kapsa...*

„La poŝo, poŝo... En la poŝo vi estas malriĉa, sed en la amo al la homoj vi havas belajn sentojn. La mondo de la homoj estas malbela, sed en la fantazio vi faras ĝin bela, bona, paca... Sinjoro instruisto, ĉu mi diras la veron? Ĉu mi komprenas vin?“ *Kapsa, kapsa... V kapse jste chudý, ale v lásce k lidem máte krásné city.*

*Svět lidí je ošklivý, ale ve vaší fantazii ho dokážete udělat krásný, dobrý, mírový... Pane učiteli, říkám pravdu? Rozumím vám?*

Zajatec se dlouho na dívku díval a neodpovídal. Také Marja mlčela. Šli dál ve směru do Kitajské ulice. Byl hezký večer. Na široké ulici běhali jen kočky a psi. Lidé seděli doma v malých ruských domech. Seděli u stolů, pili čaj, četli bibli. Na stole měli samovar a ten zvučel své zzzuuu... zzzzii... zuzizuzi... Děti si hrály v posteli. Byl večer, noc ještě nenastala. Mládež seděla na lavicích, hrála a zpívala. Klid byl v srdcích i v ruských domovech. Krásný večer se snášel na město.

Marja přemýšlí, zdali tak pěkný večer je i tam za městem, ve velikých, špinavých kasárnách pro zajatce. Zdali i tam mají lidé klid v srdci, jestli tam nevládne nenávisť mezi lidmi, mladými a starými, zdravými a nemocnými. Leží tam jeden vedle druhého a dívají se na černý strop a šedivé zdi, kde jim jejich fantazie kreslí jen smutné obrazy...

Marji se nedostává slov, ani odvahy k otázce. Přišli před nízký dům a Marja na něj ukázala: „La domo de sinjorino Bogatireva. Ši sidas ĉe la fenestro en la lernoĉambro. Ĉu vi ŝatas ŝin?“ *To je dům paní Bogatirevové. Ve třídě sedí u okna. Máte ji rád?*

„Jes, ŝi estas inteligenta sinjorino.“ *Ano, je to inteligentní paní.*

„Mi amas ŝin. Ho, ŝi estas bona, bona... Ŝi estas rusino... bona rusino...“

*Mám ji ráda. Je tak dobrá, dobrá... Ona je Ruska... dobrá Ruska...*

„Mi scias.“ *Já vím.*

„Jes... vi scias... jes...“ *Ano... vy víte... ano...*

Jdou a jdou ve večerním tichu. Marja pozoruje učitele. Ten si všímá jen cesty a nemluví. Marja si myslí: ani on nemá odvalu. Ale Marja chce mluvit tím novým jazykem.

„Sinjoro, kion vi pensas nun?“ *Pane, na co teď myslíte?*

„Mi ne havas vortojn al la respondo, kiujn vi komprenas, sed mi diras al vi, ke mi nun estas feliĉa. Vi estas bona lernantino.“ *Nemám slov k odpovědi, kterým byste rozuměla, ale mohu vám říci, že teď jsem šťastný. Jste dobrá žákyně.*

„Ĉu nur bona lernantino? Ĉu vi ne pensas, ke Marja Bulská estas ne nur bona lernantino, sed ankaŭ homo, kiu havas bonajn sentojn, bonajn pensojn?“

*Jen dobrá žákyně? Cožpak si nemyslíte, že Marja Bulská je nejen dobrá žákyně, ale i člověk, který má krásné city a dobré myšlenky?*

„Kaj ŝi havas bonan koron. Mi scias. Mi dankas al vi. Vi vidas en mi ne militkaptiton kaj ne nur instruiston, sed ankaŭ homon.“ *A máte dobré srdce. To vím. Děkuji vám. Nevidíte ve mně zajatce a jen učitele, ale také člověka.*

„Jes, homon, bonan homon.“ *Ano, člověka, dobrého člověka.*

„Sed fraŭlino, nun ne estas paco. Nun estas milito. La homoj ne estas egalaj. Ĉu vi komprenas min?“ *Ale slečno, nyní není mír. Nyní je válka. Lidé nejsou stejní. Rozumíte mi?*

„Mi komprenas vin, sed mi ne estas malkuraĝa knabino.“ *Já vám rozumím, ale já nejsem dívka bez odvahy.*

Zajatec se dívá směrem ke kasárnám a neodpovídá. Oba jdou tiše od domu k domu, z ulice do ulice. Ani Marja už nechce mluvit. Dívá se na cestu a přemýšlí ve své rodné řeči. V Čínské ulici se zastaví před malým bílým domem: „Sinjoro, mi estas hejme.“ *Pane, jsem doma.*

„Bonan nokton, fraŭlino!“ *Dobrou noc, slečno!*

Ruka se dotkla ruky, oči se dívají do očí a ve stisku ruky a v pohledu je srdečné teplo.

„Ĝis revido.“ *Nashledanou.* Marja otvírá dveře a zavírá za sebou.

Zajatec zůstal na ulici. Stojí a poslouchá, přemýšlí, přemýšlí, přemýšlí...

„Ruĝa floro en blanka Siberio... Ne, pli bone mi dirus: blanka floro en ruĝa Siberio... Ne! ... Eh, estas egale! Ŝi estas interesa knabino, kiu havas inteligentan kapon kaj bonan koron kaj... kaj mi estas nur militkaptito.“ *Rudý květ v bílé Sibíři... Ne, lépe: bílý květ v rudé Sibíři... Ne! ... Je to stejně jedno! Je to zajímavá dívka, je inteligentní a má dobré srdce a ... a já jsem jen válečný zajatec.*

A jde a jde ve večerním tichu do kasáren za městem, do kasáren, kde leží zajatci beze spánku na pryčnách, dívají se do stropu, jejich fantazie bloudí, poslouchají hovor ticha a od rána do usnutí je ovládá jen jedno slovo: Domů!

**Domů !!**

*Přeložila Jindřiška Drahotová*

---

## **Pasio**

Jana Cíhová-Hrdličková

Kirlo de la ŝaŭm“ sangonda,  
la okulojn rev-fermonta.

Kaj la kor’ alarme ŝaltas  
por atendo – spiro haltas.

Perdiĝante senrevene  
Ĝi kapablas cedi svene:

en imago al mil kisoj  
en neglekt’ de ĵurpromesoj.

Sopirante al mir-miro  
– sin etende en deliro –  
Ĝi atendas dolĉan vorton,  
en brakum’ deziras morton!

*Norda Prismo 1/63*

## Moudrost a vtip G. K. Chestertona *Výběr z citátů*

Úžas, radost  
a paradoxy života  
podle  
G. K. CHESTERTONA



dnes běžně považovány za pravdu.

Skutečně velké pravdy nelze nikdy zfalšovat; mohou být jen zapomenuty.

Pokrok by měl znamenat, že měníme svět, abychom se přiblížili k ideálu. Místo toho – neustále měníme ideály.

Pokrok nikdy nebyl nic jiného než pronásledování obyčejného člověka. Zdá se, že už nic normálního, co by se ještě normálnímu člověku dalo sebrat, nezbylo.

Utopie je svět, který chce její autor, není to svět, který chce svět.

Dostane-li se národ až na okraj propasti, bude to milenec života, který najde odvahu, aby zvolal: zpátky! Pesimista bude dále věřit v pokrok.

Typický omyl dneška! Považovat současné podmínky za absolutní a pak se snažit tomuto cíli přizpůsobit základní lidské potřeby, jako by lidská přirozenost byla nějakým prostředkem. Když někdo řekne, že rodinný život dnes nejde dost dobře sloučit s kariérou, jako by řekl, že se lidské hlavy dost dobře nevejdou do dnešních módních klobouků. Snaha likvidovat hlavy místo klobouků se pak nazve kloboučnický problém.

Umělci, kteří chválí rozklad společnosti, jsou jako červi, kteří chválí rozklad mrtvoly.

Odstraníme-li nadpřirozené, nezůstane nám přirozené, nýbrž jenom nepřirozené.

*Z knihy Tomský A. (ed.): Úžas, radost a paradoxy života podle G. K. Chestertona  
Leda [2014]*



**B U L T E N O**  
**de Esperantista Klubo en Prago**  
Časopis Klubu esperantistů v Praze  
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

**Klub esperantistů v Praze**

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7